The Esperanto Club of Grove City, Pa., was formed, with Mr. J. B. Weaver, 311 Jackson St., as secretary.

#### OHIO VALLEY DIVISION.

Prof. Harris Meyers of Evansville is now advertising his musical conservatory to open this fall with Esperanto on the curriculum. Mrs. Linna Sherman will also have the language taught in her dramatic school at Wheeling, W. Va., by Mr. Herbert Scott.

The Hebrews in Norfolk, Va., are helping the cause by selling literature and boosting the wonders of Esperanto.

A new and novel sort of Esperanto Club has been formed in Evansville, Ind. It is called "La Klubo de Geknaboj" and its members are a number of gay young people who want to learn Esperanto by play instead of work. The president of this club, Miss Speck, is a graduate of Bryn Mawr and an enthusiastic for the peace tongue.

On Friday, October 2, at the International Anti-Tuberculosis Congress, Mrs. Wilbur E. Crafts, editor of the Esperanto department of the Christian Herald gave an Esperanto Health Talk, with blackboard illustration. Miss Winifred Sackville Stoner, Jr., the five-year-old Esperanto propagandistinetto gave a selection in Esperanto on the Anti-Tuberculosis Crusade.

The first edition of Mrs. Winifred Sackville Stoner's very useful and interesting game "Ĉio" being exhausted, Mrs. Stoner is having a second and improved edition published at a reduced price for propaganda purposes by the American Esperantist Co.

#### CENTRAL DIVISION.

Reliable advice from Madison, Wis., informs us that President Van Hise of the University of Wisconsin has decided to introduce Esperanto as a regular study in charge of Prof. Prokosh.

#### PRAIRIE DIVISION

Mrs. R. B. Elliott of Omaha announces the formation of a new club of twenty-five members, *La Herbeja Asocio*, and also that her Saturday class is progressing very nicely.

#### SOUTHWESTERN DIVISION.

Mr. E. M. Taylor of Greenville, Texas., reports the formation of an Esperanto Club in that city on the 29th of August.

#### WESTERN DIVISION.

*Spokane, Wash.*—The prosperous Esperanto club at this place will have an Esperanto exhibit at the Interstate Fair in their city this fall. Esperantists of the Northwest plan to have a highly attractive exhibit in the Alaska-Yukon-Pacific Exposition at Seattle next year.

Old members of the A. E. A. sending remittances to the E. A. of N. A. and associations sending lists containing old members of the A. E. A. are earnestly requested to give the old number of the member to facilitate office work.

It is of the utmost importance that organizations take prompt action as the council is ready to proceed with the election of president and vice-president. Your councilor has as many votes as there are paid in memberships in his district, so, if you want your candidate to win, send in your dues and give your councilor more votes.

Examination papers for *Atesto pri Lernado* will not be ready before the first of October.

# LA KVARA KONGRESO

PROF. A. M. GRILLON

**E**STAS malfacila tasko priskribi pri universala kongreso de esperantistoj, precipe pri la Kvara ĉe Dresdeno; ĉar la temo estas tiel vasta kaj multaj sentoj estas tiel delikataj ke eĉ lingvo esperanta ne sufiĉas por esprimi la sentojn intimajn kiujn ĉiu vera esperantisto ĉeestanta nepre spertis. Dezirante meti ian ordon en mia priskribo, mi dividos ĝin en tri partojn: Antaŭ la kongreso; Post la Kongreso; Dum la Kongreso.

## Antaŭ la Kongreso

Maltrankviligita per la skuo donita al la esperantistaro per la delegitara afero, ekscitita per multaj artikoloj pro kaj kontraŭ presitaj en la esperantista gazetararo aŭ en la aliaj ĵurnaloj (*New York Sun* 5'a de Aprilo: "Universal Tongues Clash") mi decidis uzi mian vojaĝon tra Eŭropo por vidi per mi mem la staton de la opinioj rilate al tiu afero, eĉ antaŭ la Kongreso. Do, mi vizitis multajn grupojn en Francujo kaj Germanujo, kaj la rezultato estis malkuraĝiga. La plimulto opiniis pri reformoj, sed tre malmulte ĝis la Īdaĵ reformoj; multaj malkonfidis pri la kompetenteco de la Lingva Komitato; multaj firme kredis ke la Kvara estos malsukcesa, ke Dresdeno aliformiĝos en batalkampoj, k. t. p.

Kun tiu dorno en mia koro mi rapidis Dresdenon, kie mi alvenis tri tagojn antaŭ la malfermo de la Kongreso. Mi ankaŭ interparoladis kun ĉiuj, kaj ankoraŭ mia malkvieteco pligrandiĝis. Oni parolis grupe, mallaŭte, oni salutis unu la alian, sed ne entuziasme, kvazaŭ oni dubis, malkonfidis. Kelkaj okazajoj en formo de malamikaj rigardoj, unu bedaŭrinda efektivaĵo en la oficejo, alportis la spiritojn al la landlimo de militado. Feliĉe nenio tro malbona okazis antaŭ

**I**T IS a difficult task to describe a universal congress of Esperantists, especially the Fourth at Dresden; because the theme is so vast and many sentiments are so delicate that even the Esperanto language does not suffice for the inner feeling which each true Esperantist present surely experienced. Wishing to put some order in my description, I shall divide it into three parts: Before the Congress; After the Congress; During the Congress.

## Before the Congress

Having been disturbed by the shake given to the Esperantists by the Delegation affair, excited by many articles for and against printed in the Esperanto magazines or in other journals (*New York Sun*, April 5th: "Universal Tongues Clash") I decided to use my trip through Europe to see for myself the state of opinions toward the matter, even before the Congress. Therefore I visited many groups in France and Germany, and the result was discouraging. The larger part had opinions on reforms, but few as far as the Īdo reforms; many distrusted the competence of the Language Committee; many firmly believed that the Fourth would be a failure, that Dresden would be changed into a field of battle, etc.

With that thorn in my heart I hurried to Dresden, where I arrived three days before the opening of the Congress. I also held conversations with everyone, and still my agitation increased. They talked in groups, softly, they greeted one another, but without enthusiasm, as though they doubted, distrusted. Some occurrences in the form of unfriendly looks, one regrettable reality in the office, brought the spirits to the border-line of warfare. Happily nothing too bad hap-

la malfermo de la Kongreso, kaj ni baldaŭ vidos, ke tiu nigra nubo estis nur malkonsento, malkompreniĝo.

### Dum la Kongreso

Tuj post la malfermo la vizaĝoj kvietigis, kelkaj spertaj, feliĉaj esprimoj el la kongresa estraro elmontris klare ke la organizado ambaŭ de la Lingva Komitato kaj de la Akademio estas forta, ke oni povas fidi sur ilia kompetenteco kaj spirito. Oni fine komprenis, ke la esperantista afero estos plene zorgita, ke la reformoj, kiam ili estos necesaj, estos diskutitaj kaj enkondukitaj en la lingvo sen ke aliaj personoj ekster la esperantistaro altrudus. En la publikaj kunvenoj, en la specialaj kunvenoj, en apartaj interparoladoj, same pacemaj esprimoj infuzis ĉe ĉiuj konfidon, kvietecon kaj ĝojon. La rilatoj inter la diversaj grupoj fariĝis pli frataj, unueco superrampis ĉiun tedecon kaj la kongreso finiĝis per entuziasma fervoro; esperantismo reprenis sian marŝon antaŭen, kaj oni povas diri ke de nun, se la influo de la Kvara daŭros (tion mi firme esperas) ĉiuj estontaj baroj al la fina triumfo de Esperanto falos frakase.

La Kvara Kongreso laŭ mia opinio estis ankoraŭ plene sukcesa kiel montrilo, kiel propagandilo, mi eĉ maltimas diri, multe pli sukcesplena ol la tria; tamen, revenante el Kembriĝo neniu povis eĉ suspekti ke oni iam povus fari plie. La rimedoj, kiujn oni uzis ĉe Dreseno estis pli kvietaj, tamen pli fortaj, pli enirantaj. Certe Sakslando nun konas pli pri Esperanto, ol Anglujo. Germanoj, mi kredas, aliĝos al Esperanto pli kore, pli sincere, ĉar oni montris al ili ĝian plej gloran flankon. Ĉe Kembriĝo oni donis al nia kara Majstro reĝan akcepton, ĉe Dreseno la reĝo kaj la urbo solene akceptis Esperanton. Mi kredas, ke tiu farmaniero plaĉos pli multe al la Esperantistoj eĉ al Dro. Zamenhof; ĉar de nun ni devas labori

pened before the opening of the Congress, and we shall soon see that the black cloud was only disagreement, non-comprehension.

### During the Congress

Immediately after the opening the faces cleared, some clever, happy expressions from the congress leaders showed clearly that the organization both of the Language Committee and of the Academy was strong, and that one could put reliance upon their competency and spirit. They finally understood that the Esperanto matter would be fully taken care of, that the reforms, when they were necessary, would be discussed and introduced into the language without others outside of the Esperantists intruding. In the public meetings, in special meetings, in private conversations, the same pacifying expressions infused all with confidence, tranquility and joy. The relations among the various groups became more fraternal, unity overcame all unpleasantness and the congress ended with enthusiastic fervor; Esperantism again took its march forward, and one can say, that from now, if the influence of the Fourth continues (as I firmly believe) all future bars to the final triumph of Esperanto will fall shattered.

The Fourth Congress in my opinion was entirely successful as a demonstration, as a means of propaganda; I even dare to say, much more successful than the third; however, returning from Cambridge no one could even suspect that any one ever could do more. The methods which they used at Dresden were more quiet, yet stronger, more penetrating. Certainly Saxony is better acquainted with Esperanto than is England. Germans will join Esperanto more heartily and more sincerely, I believe, because they showed them its most glorious side. At Cambridge they gave to our dear Master a regal reception, at Dresden the king and the city solemnly received Esperanto. I believe that mode of action will be more pleasing to the Esperantists, even to Dr. Zamenhof; for after this we must work for the language itself, which



por la lingvo mem, kiu fariĝis plenaĝa kaj ne plu tiom bezonas vartadon.

Lia Moŝta Reĝo tre publike protektis la Kongreson. Li pruntedonis la reĝan teatron por la prezentado de Ifigenio kaj li pruntedonis kvar el siaj vaporŝipoj al la esperantistoj por la veturado al Meissen kaj al Wehlen. La reĝa palaco de Pilnitz estis iluminita nokte je la pasado de la ŝipoj. Lia moŝta Reĝo ĉeestis la ripetado de Ifigenio kaj li intencis ĉeesti la ludo mem, sed okazaĵo malhelpis lian ĉeeston. Neniu povus fari plie.

La urbo Dresdeno pruntedonis al la Kongreso la Teknikan Lernejon, kaj la ĉiujn tramveturilojn de la urbo, kiujn la kongresanoj povis senpage uzi dum ok tagoj nur montrante kongresan karton. Dudek kvar policanoj parolantaj bone Esperanton stariĝis ĉe anguloj de stratoj, la verda stelo ĉe l' brako. Miloj da verdaj standardoj pendiĝis ĉe l' fenestroj kie esperantistoj loĝis. Ĉiu tramveturilo havis sur ambaŭ flankoj grandan verdan karton sur kiu oni povis legi esperante informojn pri veturado. Grandmeritaj artistoj el Berlino kaj Praho profuze kaj kore elmontris sian talenton por la gloro de Esperanto kaj la ĝojo de esperantistoj. Ni longatempe rememoros tiun belan, belegan semajnon ĉe Dresdeno.

Jam de la komenco de la Kongreso oni parolis pri la Kvina, kaj ju pli oni alvenis al la fino des pli oni diskutis ĉu estos la Kvina en Ameriko aŭ Hispanujo. Multaj opiniis por Ameriko, samtempe ili diris: "Estas tre malproksime, tre malmultaj havas sufiĉe da mono por fari tiel grandan vojaĝon." Tamen, ili ĉiam revenis al ni allogitaj per la sola nomo Ameriko. "Kiom da mono necesas por iri Amerikon?" "Ĉu vi opinias, ke kvarcent spesmiloj sufiĉos?" "Se oni povus aranĝi rondvojaĝon por kvarcent spesmiloj mi irus." Kaj centoj da kongresanoj diris al mi, ke ni povas kalkuli je la ĉeesto de kvincent eŭropanoj se ni povas aranĝi la vojaĝon por tiu sumo.

has reached its majority and no longer has so much need of nursing.

His Majesty gave Esperanto his protection in a very public manner. He lent the royal theatre for the presentation of Ifigenio and he lent four of his steamboats to the Esperantists for the trip to Meissen and Wehlen. The royal palace of Pilnitz was illuminated by night for the passing of the boats. His Majesty attended the rehearsal of Ifigenio and intended to attend the play itself, but an accident prevented his attendance. No one could have done more.

The City of Dresden lent to the Congress the Technical School, and all the street railways of the city, which the attendants at the congress were allowed to use without cost, only showing their congress ticket. Twenty-four policemen, speaking Esperanto well, stood at the street corners with the green star on their arms. Thousands of green flags were hanging at the windows where the Esperantists were lodged. Each street car had on both sides a large green card upon which one could read in Esperanto information of its route. Artists of note from Berlin and Prague profusely and heartily displayed their talent for the glory of Esperanto and the enjoyment of the Esperantists. We shall for a long time remember that fine, splendid week at Dresden.

Even from the beginning of the Congress they talked about the Fifth, and the nearer came the end, the more they discussed whether the Fifth should be in America or Spain. Many favored America, at the same time they said: "It is distant, few have enough money to take so long a voyage." Yet they always returned allured by the very name America. "How much money is necessary to go to America?" "Do you think that two hundred dollars will be enough?" "If a round trip could be arranged for two hundred dollars I would go." And hundreds of those at the congress told me, that we could count on the attendance of five hundred Europeans, if we could arrange the trip for that amount.

Aliflanke la hispanoj disdonis broŝuretojn, elmontrante vidaĵojn el ilia bela lando, kaj ankaŭ multaj esperantistoj promesis iri Hispanujon. La lasta tago de la Kongreso alvenis, kaj en la lasta kunsido oni diskutis pri la loko de la venonta Kongreso. La hispanoj parolis, la amerikanoj parolis, kaj fine oni decidis havi la Kvinan en Ameriko dum la monato Aŭgusto kaj la Sesan en Hispanujo. Ĉiuj ŝajnis kontentaj, kaj oni disiĝis. Mi opinias, ke malgraŭ la proksimeco de Hispanujo por la eŭropanoj, kiuj estas la plimulto de la kongresanoj, ni povas kalkuli je la dezirego vidi Amerikon, kiu kuŝas en la koro de ĉiu eŭropano. Multaj faros oferaĵon por veni al Ameriko, kiam ili ne farus dekonon da elspezoj por iri kongreson en Eŭropo. Scivoleco ludos grandan rolon, kaj ni povas kalkuli je kvincent eksterlandanoj se ni povas havi nur unu trionon da rabato sur la vaporŝipoj kaj sur la fervojoj.

Mi jam diris, ke la Lingva Komitato estas fortege organizita. Oni reelektis ĝiajn membrojn, forlasante ĉiujn kiuj aŭ ne taŭgis aŭ ne respondis al la demandoj. Ĝi nun havas nur ĉirkaŭ okdek membrojn, sed oni elektos iom post iom multajn aliajn anojn eble ĝis ducent, kaj nur verajn kaj kapablajn esperantistojn. La Unuigitaj Ŝtatoj havas tre malmulte da komitatoj, sed oni promesis elekti baldaŭ kvar aŭ kvin laŭ la peto de la kongresanoj, kiuj pensas, ke lando tiel agema, tiel progresema por nia afero devus havi voĉojn en la administrado de la esperantistaro.

La Akademio havis nur naŭ membrojn antaŭ la Kongreso. Oni elektis tri dum la Kongreso, kaj pli malfrue oni intencas elekti dekdu aliajn. La kunlaborado de tiuj du komitatoj ebligos la naturan evoluon de la lingvo, kaj ĉiu esperantisto povas fidi pri la kompetenteco de nia registaro.

#### Post la Kongreso

Kiel antaŭe, antaŭ la Delegitara enmikso, la kongresanoj premis la manon

On the other hand the Spaniards gave out pamphlets, showing the views of their beautiful country, and many Esperantists promised to go to Spain. The last day of the Congress arrived, and in the last meeting they discussed the place for the next Congress. The Spaniards talked, the Americans talked, and finally they decided to have the Fifth in America during the month of August, and the Sixth in Spain. All seemed satisfied, and they separated. I believe that in spite of the proximity of Spain for the Europeans, who make up the greatest part of those at the congresses, we can count upon the desire to see America, which is in the heart of every European. Many will arrange matters to come to America when they would not make a tenth of the expenditure to go to a congress in Europe. Curiosity will play an important part, and we can count upon five hundred foreigners if we can have the rates on steamers and railways discounted a third.

I have already said that the Language Committee is strongly organized. They reelected its members, leaving out all who either were not fit or did not respond to the questions. It now has only about eighty members, but they will elect from time to time many other members, possibly up to two hundred, and only real and capable Esperantists. The United States has very few members of the Committee, but they have promised soon to elect four or five at the request of the *kongresanoj*, who thought that a country so active and progressive for our cause should have voices in the administration of the Esperantists.

The Academy had only nine members before the Congress. They chose three new members during the Congress, and later they expect to elect twelve others. The collaboration of these two committees will render possible the natural evolution of the language, and every Esperantist can trust in the competence of our government.

#### After the Congress

As previously, before the interference of the Delegation, the *kongresanoj* shook

unu la alian kore, kviete, montrante ĝojan konfidan mienon; ili disiĝis kun la espero ke por ĉiam ni estas ree unuigitaj sub la sama penso kaj deziro—la celo al kiu kuraĝe ni alkuras.

Ni ĉiuj amerikaj kongresanoj, do, alportas al niaj samlandanoj tiun preciozan juvelon—la unuecon, la fervoron, la kuraĝon kiu necesas al ni por plenumi nian titanan taskon: pretigi la Kvinan kaj fari ĝin eĉ pli sukcesa ol la Kvara. Ni havas la unuan okazon montri kion Ameriko kaj la amerikanoj povas fari. Nia lando ne estas sufiĉe konata, ni devas elmontri ĝin al la eŭropanoj. Ni devas devigi al ili diri je ilia reiro hejmen: Ni malkovris Amerikon. Estas al ni eble la unua oportuneco elmontri la superecon de niaj ideoj, de niaj institucioj, de nia senlaca energio. Samtempe kiam ni laboros por Esperanto, samtempe kiam ni elmontros nian esperantan fortecon, ni ankaŭ elmontros la liberecon de nia lando—niajn lernejojn, nian industrian superecon, nian superan civilizacion.

Ni laboru unuece; ni tuj komencu la organizadon se ni volas esti pretaj, ĉar unu jaro estas tre mallonga tempo por plenumi tiom da laboro.

### La Ekskursoj

La Kvara organizis du belajn ekskursojn dum la Kongreso. La unua estis al Meissen. La montoj de la lando havas nomon "Erzgebirge," kio signifas montaro plena je metaloj. Oron kompreneble oni ne trovas, kaj la arĝento apenaŭ rekompencas la laboron; sed tiu ĉi feliĉa lando enhavas multvalorajn metalojn, kiuj ebligas la fabrikadon de porcelano, kaj ili estas pli ŝatataj ol oro aŭ arĝento. En la jaro 1710 Sro. Johano Federigo Boettger prosperis eltrovi la veran porcelanon malmolan kaj senporecan. La unua porcelano estis bruna pro feraj almiksaĵoj, sed preskaŭ samtempe la eltrovinto feliĉe sukcesis fabrikii blankan porcelanon. En Saksujo same kiel en aliaj landoj la princoj protektis la novan eltrovon, artajn porcelanaĵojn ili kolektis, donacis kaj donace akceptis.

each other's hands heartily, quietly, with joyful, confident mien; they departed with the hope that for all time we are again united with the same thought and desire—the aim to which we courageously hasten.

All we American kongresanoj, therefore, bring to our country-men that precious jewel—unity, fervor and courage which we need in order to fulfill our titanic task of preparing the Fifth and making it even more successful than the Fourth. We have the first chance to show what America and the Americans can do. Our country is not thoroughly well known, therefore we must show it to the Europeans. We must make them say, on their return home: "We have discovered America!" It is possibly the first opportunity for us to demonstrate the superiority of our ideas, of our institutions, of our untiring energy. At the same time we work for Esperanto, when we demonstrate our Esperanto strength, we will also show forth the liberty of our country—our schools, our industrial superiority, our superior civilization.

Let us labor in unity; let us at once begin organization if we wish to be ready, for one year is a very short time to accomplish so much work.

### The Excursions

The Kvara arranged two fine excursions during the Congress. The first was to Meissen. The mountains of that country have the name "Erzgebirge," which signifies a mountain range full of metals. Gold of course is not found, and silver hardly pays for the work; but this fortunate country contains metals of great value, which make possible the manufacture of porcelain, and they are better prized than gold or silver. In the year 1710 Johann Federigo Boettger was so fortunate as to discover real porcelain, hard and nonporous. The first porcelain was brown because of admixtures of iron, but about the same time the discoverer succeeded in making white porcelain. In Saxony as in other lands the princes protected the new discovery, they collected art porcelain ware, and gave and received it as gifts. Soon the

Baldaŭ la nova eltrovo liveris tre valoran komercaĵon, ankaŭ nun la reĝo estas la posedanto de la porcelanfabrikejo en Meissen.

La kongresanoj, dum la dua tago de la Kongreso, mardo 18'a de Aŭgusto, je la dek unua matene eniris la vaporŝipojn de la Reĝo, forveturis sur la bela riverego Elbe, kaj alvenis Meisenon je la tria posttagmeze. Tie ili havis tempon viziti la porcelanfabrikejon, la katedralon, kie oni donis koncerton, kaj la reĝan palacon. Post la akcepto en la urbodomo, post la vespermanĝo oni ĉeestis en Burgersall ĉe la ludo esperanta "La Malfeliĉuloj," kies dek unu aktoroj estis elĉerpitaj el dek unu nacioj. El la Burgersall oni marŝis al la stacidomo, kie speciala vagonaro atendis nin je la noktomezo. Tre malmultaj esperantistoj suspektis la kialon de tiel malfrua forveturado; sed kiam oni alvenis sur la ponto de la Elbe belega vidaĵo rekompencis nin pro nia silento kaj obeemo. Belega kastelo kuŝas sur la bordo de la rivero, kaj subite ĝi estis iluminata per multaj ruĝaj lumoj montrantaj en la nokto senparoleblan skizon de la kastelo, de la ŝtonegaretoj kaj de la monteto; kaj dum ĉiuj miregis al tia belaĵo oni aŭdis belegan sonon de ĉaskorno ludanta la "Trompete von Sackigen." La vidaĵo, la ludado de la ĉaskorno premis ĉiun koron; tomba silento superregis, oni ne plu spiris ĝis la fino de tiu fantastika vidaĵo. multaj el ni neniam vidis kaj aŭdis antaŭe tiom da beleco.

La ekskurso al Saksa Svisujo okazis jaŭdon, la 22'an de Aŭgusto. Kiel en la ekskurso al Meiseno, oni enŝipiĝis sur kvar vaporŝipoj kaj dum la tutan tagon oni promenis tra la belaj montetoj ŝtonegaj, kiuj faras Saksujon la konkuranto de Svisujo. La vidaĵoj tie ne estas tiel sovaĝaj kiel en Svisujo, sed mi diras malkaŝe pli belaj; aŭ pli vere estas alia speco de beleco, pli ŝatinda. Ni vizitis Wehlen, Bastei, k. t. p., kaj revenis ankoraŭ nokte, ĉar aliaj surprizoj atendis nin. Dum la du horoj de ŝipveturado ĉe ambaŭ flankoj de la riverego Elbe, ĉiu kastelo, ĉiu vidaĵo, ĉiu arbareto estis

new discovery yielded a very valuable commodity, and now the king is the owner of the porcelain factory in Meissen.

The kongresanoj, during the second day of the Congress, Tuesday, August 18, at eleven in the morning boarded the steamboats of the king, steamed upon the river Elbe, and arrived at Meissen at three in the afternoon. There they had time to visit the porcelain factory, the cathedral, where a concert was given, and the royal palace. After the reception in the city hall and after the evening meal, they attended in "Burgersall" the Esperanto play, *La Malfeliĉulo*, whose eleven actors were drawn from eleven nations. From the "Burgersall" they walked to the station, where a special train awaited them at midnight. Very few Esperantists suspected the reason of such a late journey; but when they arrived on the bridge of the Elbe, a splendid view recompensed them for their silence and obedience. A magnificent castle stands upon the border of the river, and suddenly it was illuminated by many red lights showing in the night an indescribable outline of the castle, of the crags and the hill; and while all were struck with wonder at such beauty, they heard the sound of a hunter's horn playing the "*Trompete von Sackigen*." The sight, the playing of the hunter's horn, impressed each heart; the silence of the tomb reigned over all, and one held his breath until the end of that fantastic picture. Many of us had never seen nor heard before so much of beauty.

The excursion to Saxon Switzerland occurred Thursday, the 22 of August. As in the excursion to Meissen, we boarded four steamboats, and during the entire day journeyed through the beautiful craggy hills, which make Saxony the competitor of Switzerland. The views there are not so wild as in Switzerland, but I pronounce them without hesitation to be more beautiful; or, more truly, it is another style of beauty, more pleasing. We visited Wehlen, Bastei, etc., and returned again at night, for other surprises awaited us. During the two hours of the voyage, on both sides of the river Elbe, every castle, each view, each little



iluminata per lumoj diverskoloraj, kaj samtempe fajradoj kaj pafadoj faris el tiuj du horoj senĉesan feinan miraĵon. La kastelo reĝa de Pilnitz ankaŭ estis iluminita per lampoj kaj fajradoj. Ŝajnis al ni ke ĉiuj loĝantoj de la lando estis piede por festi Esperanton kaj la esperantistojn.

La ludado de "Ifigenio en Taŭrido" certe estis la kronaĵo de ĉio. Ĝi okazis merkredon vespere ĉe la reĝa operdomo. Mia plumo rifuzas skribi pri tiu senkompara nokto. La temo de la ludo, la ornamaĵoj, la perfekteco de la roloj, kaj precipe la perfekta elparolado de la ludantoj, estas aferoj kiujn oni devas vidi kaj aŭskulti, sed ne priskribi. Neniam nia kara lingvo sonadis tiel melodie kiel en tiu okazo. Esperanto taŭgas por elparolado, por korespondado, por artkantoj, kaj ankoraŭ eĉ pli bone por ludado de grandaj verkoj.

wood, was illuminated with varicolored lights, and at the same time fireworks and fusillades made of those two hours a ceaseless fairy wonder. The royal castle of Pilnitz was also illuminated with lamps and fireworks. It seemed to us that all the inhabitants of the country were out to celebrate Esperanto and the Esperantists.

The presentation of *Ifigenio en Taŭrido* was certainly the crowning event of all. It took place Friday evening at the royal opera house. My pen refuses to write of that incomparable night. The theme of the play, the decorations, the perfection of the roles, and particularly the perfect enunciation of the players, are things which one must see and hear, but not describe. Never did our *Karalingvo* sound as melodious as on that occasion. Esperanto is adequate for the needs of speech, of correspondence, of artistic singing, and still even better for the presentation of great works.

## RAPORTO DE DRO. K. BEIN

*Esperantistoj:* Mi havas la honoron prezenti al vi raporton pri la fondo de la Esperantista Akademio kaj pri la laboroj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio dum la Dresdena kongreso.

Por forigi la malutilojn de la grandnombreco de la Lingva Komitato, la prezidanto prezentis al la ĝiaj anoj projekton de reorganizo de la Komitato,— ĝian dupartigon, formante en ĝi Konstantan Superan Komision aŭ Akademion el 18 membroj. Laŭ tiu ĉi projekto, ĉiuj komitatanoj havas egalan rajton elekti novajn membrojn, baloti membrojn de la Akademio, esti balotataj en ĝin, proponi demandojn kaj diskuti la proponitajn temojn, sed nur la Akademio decidos, kun tiu rezervo tamen, ke la plena Lingva Komitato povas ĉiam postuli duan pridiskuton kaj en tia okazo eldiri la finan decidon.

Kiam la provizora regularo de la nova

projekto estis akceptita de la Lingva Komitato (per 66 voĉoj el la 80 voĉdonintoj), la prezidanto, konforme al la 8-a artikolo de la regularo, dissendis al la Lingva Komitato anoj liston de 26 kandidatoj en la Akademion, proponante dume elekti nur 12 membrojn. La rezultato de la baloto estis jena: per absoluta plimulto estis elektitaj nur 9 akademianoj, kies nomoj estas: Boirac, Bein, Cart, Grabowski, Moch, Saussure, Nylen, Mybs, Villanueva, t. e. 4 franclingvanoj, 2 poloj, 1 svedo, 1 germano kaj 1 hispano.

La unua tasko de la akademianoj, kunvenintaj en Dresdeno antaŭ la kongreso, estis elekti sian estraron. Oni decidis pligrandigi la nombron de la vicprezidantoj ĝis 3-4 kaj provizore elekti nur parton de la estraro (prezidanton kaj 2 vic-prezidantojn), prokrastante la elekton de la ĝenerala sekretario kaj de

1-2 pluaj vic-prezidantoj ĝis la tempo, kiam la Akademio estos plennombra. Estis elektitaj: Rektoro Boirac, prezidanto. Dr. Bein kaj Dr. Mybs, vic-prezidantoj.

Jen la ĉefaj rezultatoj de la laboroj de l' Akademio kaj de la Lingva Komitato dum la IV kongreso.

1. Estis fonditaj 4 konstantaj komisioj aŭ sekcioj: *a*—por la gramatiko, *b*—por la komuna vortaro, *c*—por la teknika vortaro kaj *d*—por la internaj kaj ĉiuj aliaj aferoj. Kiel direktoroj de la 4 sekcioj estis elektitaj *a*—S-o Grabowski-gramatiko, *b*—Pr. Cart-komuna vortaro, *c*—Pr. Saussure-teknika vortaro, *d*—S-o Moch-internaj aferoj.

2. Estis redaktita de la Akademio kaj aprobita de la Lingva Komitato la deklaro pri la rolo de la Lingva Komitato. Jen ĝia teksto: "La tasko de la Lingva Komitato estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin laŭ la suprediritaj principoj. Neniel la Fundamento, nek la Lingva Komitato povas esti baro por la normala evolucio de la lingvo, kiun ili, kontraŭe, certigas.

Dank' al la fondo de la Akademio la Lingva Komitato, nun praktike reorganizita, publikigos antaŭ la fino de la jaro, kiel oficialan aldonon de la Universala Vortaro, la rezultaton de la jam faritaj laboroj; poste aperos studoj pri la teknika vortaro kaj pri la sintakso.

Trankvile kaj firme, laŭ la konsilo de

nia Majstro, Esperantistoj, ni povas iri nian vojon.

3. Estis preparita listo de kandidatoj en la Lingva Komitato. Tiu listo ne estas ankoraŭ definitiva, kaj ĉiuj esperantistaj societoj, grupoj kaj eĉ izolitaj Esperantistoj havas la rajton kaj estas petataj sendi la nomojn de siaj kandidatoj al la estraro de la Akademio.

4. La Akademio kaj la Lingva Komitato akceptis la proponon de Dr. Mybs pri averto, dissendota al la kandidatoj en la Lingva Komitato. Jen ĝia teksto: "Oni memorigas, ke elektante iun membro de la Lingva Komitato oni intencas postuli de li efektivan laboradon, kiam estos necese, kaj ne doni nur al li honoran titolon. Oni insiste petas, ke la Lingva Komitato anoj neniam uzu tiun titolon por reklama celo, ĉar tia malbonuzo povus tre malutili la aŭtoritaton de la Lingva Komitato."

5. Estis akceptita de la Lingva Komitato la propono de la prezidanto fondi specialan kason.

Esperantistoj! Nia forteco, kiel diris la Majstro, ne estas la merito de iu el ni aparte, sed ĝi estas nur la rezultato de multjara pacienca laborado de multo da personoj. Ne dubante, ke tiu ĉi multo—la tuta Esperantistaro helpados Lingvan Komitaton, ni kun plena espero rigardas la estoncecon, ĉiam instigataj al la laboro per la flama deziro plej baldaŭ vidi la definitivan triumfon de Esperanto.

Weisser Hirsch, 26'an de Aŭgusto, 1908.



# LA PAROLADO DE ZAMENHOF

## EN DRESDENO

### *Sinjorinoj kaj Sinjoroj!*

Aperante antaŭ vi kiel tradicia malfermanto de la esperantistaj kongresoj, mi permesas al mi antaŭ ĉio esprimi la plej respektan dankon de nia kongreso al Lia Regnestra Moŝto la Reĝo Frederiko Aŭgusto de Saksujo por la granda honoro, kiun li faris al ni, prenante sur sin la altan protektadon de nia kvara kongreso. Mi esprimas ankaŭ profundan dankon de nia kongreso al Sinjoroj la Ministroj kaj aliaj eminentaj personoj, kiuj bonvolis eniri en la honoran prezidantaron kaj honoran komitaton de nia kongreso. Mi esprimas ankaŭ nian dankon al tiuj landoj, kiuj sendis al nia kongreso oficialajn delegitojn, kaj al la alilandaj konsuloj, kiuj honoris nin per la reprezentado de iliaj landoj ĉe nia malferma kunveno. Nun la unuan fojon nia kongreso aperas sub la oficiala sankcio de regnestro kaj registaro; mi estas certa, ke la Esperantistoj alte taksos la gravecon de tiu ĉi fakto; mi esperas, ke ĝi estos komenco de tiu nova tempo, kiam nia ideo ĉesos esti penado de nur privataj personoj, sed ĝi fariĝos grava tasko por la registaroj de la mondo.

En la nomo de la kvara tutmonda esperantista kongreso mi salutas la landon germanan, kies gastoj ni ĉiuj estas en la nuna momento; precipe mi salutas la Saksan reĝlandon, kiu al ni, filoj de la plej diversaj landoj kaj gentoj, aranĝis belan akcepton en sia centro mem, en sia fama kultura ĉefurbo. Mi esprimas nian koran dankon al la Saksa registaro kaj precipe al la Dresdena urbeŝtaro por la tuta helpo, kiun ili donis al nia kongreso, kaj por la saluto, kiun ili aŭdigis al ni per siaj estimataj reprezentantoj.

Fine mi esprimas, certe en la nomo de

ĉiuj esperantistoj, nian koran kamaradan dankon al niaj germanaj samideanoj kaj antaŭ ĉio al nia Kvaro por la Kvara, kiuj prenis sur sin la malfacilan taskon aranĝi nian kongreson ĝuste en ĉi tiu jaro, kiam ekzistis tiom da malhelpoj, kaj kiuj, dank' al sia granda sindoneco, aranĝis ĉion en la plej bona maniero kaj enskribis per tio tre gravan paĝon en la historion de nia afero.

Germanujo, la lando de la filozofoj kaj poetoj, kiu estis iam la centro de la humanistoj, havas por nia ideo specialan signifon per tio, ke en ĉi tiu lando, dank' al la neforgesebla granda merito de la pastro Johann Martin Schleyer, nia ideo ricevis sian unuan disvolviĝon kaj la unuan potencon puŝon antaŭen. Germanujo sekve estas la lulilo de la ideo de lingvo internacia. Ni, speciale esperantistoj, havis ankaŭ en Germanujo niajn unuajn plej gravajn batalantojn, Einstein kaj Trompeter. Estas vero, ke poste en la daŭro de tre longa tempo nia ideo en ĉi tiu lando ŝajnis tute mortinta; sed en la lastaj jaroj ĝi tie ĉi denove vigle reviviĝis, kaj ni havas plenan esperon, ke post nia nuna kongreso, kiam la Germanoj ekkonos nin pli proksime kaj konvinkiĝos per siaj propraj okuloj kaj oreloj, ke ni ne estas iaj teoriaj fantaziuloj, nia afero ĉi tie ekfloros ne malpli potence, ol en la aliaj grandaj landoj, kaj en la komuna ĉiuhoma afero Germanujo baldaŭ okupos unu el la plej honoraj lokoj.

### *Karaj Samideanoj!*

En la daŭro de la lasta jaro en nia afero okazis faktoj, kiuj maltrankviligis por iom da tempo la mondon esperantistan. Nun ĉio jam denove trankviligis. Nia arbo, pri kiu mi parolis en Kembrigo, en la pasinta jaro plej konvinke

montris sian tutan fortecon kaj sanecon, ĉar malgraŭ la tute ne atenditaj atakoj, kiuj en la daŭro de kelka tempo kaŭzis grandan krakadon, la arbo konservis sian tutan potencon kaj perdis nur tre malmultajn foliojn. Malgraŭ la kaŝite preparitaj kaj rapide plenumitaj atakoj, kiuj ne donis al niaj soldatoj la povon dece orientiĝi kaj interkomunikiĝi, ĉiu el ili sur sia aparta loko staris forte kontraŭ ĉiuj forlojoj, kaj nur tre malmultaj lasis sin kapti per lertaj vortoj. Super la okazintaj faktoj ni povus sekve silente transiri al la tagordo. Tamen, por gardi niajn venontajn batalantojn kontraŭ similaj surprizoj, mi permesos al mi diri kelke da vortoj pri tiu temo. El la tempo pasinta ni ĉerpu instruon por la tempo venonta.

Pasis jam ĝuste tridek jaroj de la momento, kiam Esperanto unue aperis antaŭ malgranda rondo da amikoj; pasis jam dudek unu jaroj de la momento, kiam Esperanto unue aperis publike antaŭ la mondo. Tre malforta ĝi estis en la unua tempo, ĉiu plej malgranda bloveto povis ĝin renversi kaj mortigi. Ĉiu bona vorto de la plej sensignifa homo aŭ de la plej senvalora gazeto donis al niaj pioniroj esperon kaj kuraĝon; ĉiu atakanta vorto kaŭzis al ili doloron. Kiam antaŭ dudek jaroj la Amerika Filozofia Societo volis preni la aferon de lingvo internacia en siajn manojn, tio estis por la aŭtoro de Esperanto tiel altega kaj neatingebla aŭtoritato, ke li, kiu tiam havis ankoraŭ la rajton disponi pri Esperanto, tuj decidis ffordoni ĉion al la manoj de tiu societo, ĉar, estante tute sensperta, li tiam ankoraŭ ne sciis, kia grandega diferenco estas inter teorio kaj praktiko.

Feliĉe la entrepreno de la Amerika societo ne sukcesis. Mi uzas la vorton "feliĉe", ĉar efektive nun, kiam mi estas pli sperta, por mi estas afero tute senduba, ke, se la entrepreno de tiuj teoriistoj daŭrus iom pli longe, la tuta ideo de lingvo internacia jam de longe estus tute senkreditigita kaj enterigita por ĉiam, aŭ almenaŭ por tre longa, longa tempo.

Niaj pioniroj laboris, kaj la afero kreskis. Baldaŭ ni ĉiam pli kaj pli

akiradis la konvinkon, ke de teoriistoj ni devas atendi tre malmulte da bono por nia afero; ke ĉiuj laŭdoj kaj mallaŭdoj de flankaj personoj havas por ni nur tre malgrandan signifon; ke ni devas fidi nur niajn proprajn fortojn, nian propran paciencon kaj konstantecon; ke la mondo venos al ni nur tiam, kiam ĝi vidos en ni potencon, kiam ĝi vidos, ke ni ne palpas en mallumo, ke ni ne perdas hodiaŭ, kion ni akiris hieraŭ, ke nia vojo estas klara kaj rekta kaj ni de ĝi neniam deflankiĝas.

Sed ne per unu fojo ni venis al tiu fortika konvinko. En la unua tempo, vidante, ke nia afero progresas tre malrapide kaj malfacile, multaj esperantistoj pensis, ke la kaŭzo de tio kuŝas en nia lingvo mem, ke, se ni nur ŝanĝos tiun aŭ alian detalon, la mondo tuj venos al ni en granda amaso. Tiam venis la periodo de la granda postulado de reformoj. Feliĉe tiu periodo daŭris ne longe. La esperantistoj baldaŭ konvinkiĝis, ke veni al ia komuna, ĉiujn kontentiganta kaj silentiganta interkonsento pri la esenco de la reformoj estas tute ne eble, kaj la ekstera mondo, kiujn la reformemuloj celis, restis absolute indiferenta koncerne tion, ĉu tiu aŭ alia detalo havas en nia lingvo tian formon aŭ alian; oni baldaŭ konvinkiĝis, ke per reformado ni nur perdos ĉion ĝis nun akiritan kaj gajnos absolute nenion. Tiam la esperantistoj firme decidis ne paroli plu pri iaj reformoj. Kelkaj tre malmultaj malkontentuloj forlasis Esperanton kaj kune kun kelkaj ne-esperantistoj, kiuj rigardis sin kiel plej kompetentajn en la afero de lingvo internacia, komencis inter si ĝis nun ankoraŭ ne finiĝintan kaj neniam finiĝontan diskutadon pri diversaj lingvaj detaloj, kaj ili staras nun sur tiu sama punkto, sur kiu ili staris antaŭ dekkvar jaroj. La tuta cetera esperantistaro en plena harmonio forte grupiĝis ĉirkaŭ sia konstanta standardo kaj faris de tiu tempo grandan, grandegan marŝon antaŭen.

De la tempo, kiam la esperantistoj ĉesis paroli pri reformoj, komenciĝis por Esperanto periodo ĉiam pli kaj pli brilanta. En la komenco, sub la premo de tre grandaj malhelpoj eksteraj, ni



progresadis tre malrapide kaj malfacile. Sed sub la influo de nia plena interna harmonio kaj nia nedekliniĝa irado rekte antaŭen, niaj fortoj ĉiam pli kaj pli kreskis. Nun ni atingis tian potencon, pri kiu multaj el ni antaŭ dek jaroj ne kuraĝis eĉ reŝi, kaj se ni marŝos en tia sama harmonio kiel ĝis nun, nenia forto en la mondo povos haltigi nian iradon, kaj ni plene atingos nian celon. Ĉiuhore kreskas la nombro de niaj partianoj, ĉiutage pligrandiĝas la nombro de niaj grupoj. Nia literaturo kreskas tiel senhalte kaj rapide, ke multaj malgrandaj nacioj jam nun povas nin envii. La praktika uzado de nia lingvo fariĝas ĉiam pli kaj pli granda. Dum ankoraŭ antaŭ ne longe oni tute silentis pri ni kaj poste oni nin mokis, nun oni jam ĉie nin respektas, kiel grandan potencon. Eĉ tiuj niaj principaj kontraŭuloj, kiuj antaŭ ne longe malŝate rigardis nin de alte, nun jam krias alarmon.

Nia lingvo mem konstante pli riĉiĝas kaj elastiĝas. Iom post iom konstante aperas novaj vortoj kaj formoj, unuj fortikiĝas, aliaj ĉesas esti uzataj. Ĉio fariĝas kviete, senskue kaj eĉ nerimarkeble. Nenie montriĝas ia diferencigado de nia lingvo laŭ la diversaj landoj, kaj ju pli spertaj fariĝas la aŭtoroj, des pli similiĝas reciproke ilia uzado de nia lingvo, malgraŭ la granda malproksimeco de iliaj lokoj de loĝado. Nenie rompiĝas aŭ difektiĝas la kontinueco inter la lingvo malnova kaj nova, kaj malgraŭ la fakto, ke nia lingvo forte disvolviĝas, ĉiu nova esperantisto legas la verkojn de antaŭ dudek jaroj kun tia sama perfekta facileco, kiel esperantisto tiutempa, kaj li eĉ ne rimarkas, ke tiuj verkoj estas skribitaj ne nun, sed en la unua, suĉinfana periodo de nia lingvo.

Nia afero regule kaj trankvile iras antaŭen. La tempo de la teoriaj juĝoj kaj de kliniĝado antaŭ ŝajnaj aŭtoritatoj jam de longe pasis. Se iu nun esprimas sian opinion aŭ konsilon pri Esperanto, oni jam ne demandas, ĉu li estas homo grandfama aŭ ne,—oni nur demandas, ĉu liaj konsiloj estas konformaj al la naturaj bezonoj kaj la natura irado de nia lingvo aŭ ne. Se iu glornoma persono en plena nesciado de nia afero

esprimas iun el tiuj sensecaĵoj, kiujn ni jam tiel ofte aŭdis, ekzemple, ke arta lingvo estas utopio, ke la esperantistoj sin reciproke ne komprenas, k. t. p., aŭ se li, forgesante la nunan staton de Esperanto kaj la teruran ekzemplon de la Volapuka akademio, postulas, ke ni rebaku la tutan lingvon laŭ lia teoria recepto,—tiam ni, esperantistoj, indiferecie ĉion aŭskultas kaj trankvile iras nian vojon.

Ne por fieri pri nia forteco mi diras ĉion ĉi tion; neniu el ni havas la rajton esti fiera, ĉar nia forteco ne estas la merito de iu el ni aparte, sed ĝi estas nur la rezultato de multejara pacienca laborado de *multo* da personoj. Mi volis nur atentigi vin pri tio, ke en nia afero ĉio povas esti atingita nur per harmonio kaj konstanteco. Se nin ne gvidus fera konstanteco, nia lingvo jam de longe ne ekzistus, kaj la vortoj "lingvo internacia" estus nun la plej granda mokataĵo por la mondo.

La longa kaj malfacila batalado nin hardis, kaj ne sole la voĉoj de apartaj personoj, sed eĉ la premo de ia granda potenco nun jam ne povus deklini la esperantistaron de ĝia klara kaj rekta vojo. Kia do estas la kaŭzo, ke en la pasinta jaro en nia tendero subite naskiĝis tia granda vento, kiu en la daŭro de momento minacis alporti al ni tiom da malbono? Kiu estis tiu ŝajne grandega forto, kiu por momento enportis tian neatenditan konfuzon en nian mezon? Nun, kiam ĉio jam klariĝis, ni povas konfesi, ke ĝi ne estis ia eksterordinare granda potenco, ĝi estis simple kelkaj malmultaj personoj; sed la danĝereco de ilia atako konsistis en tio, ke tiu atako ne venis malkaŝe el ekstere, sed ĝi estis kaŝite preparita kaj tute neatendite aranĝita *interne* de nia tendero.

Ĝi estas historio, pri kiu mi ne volas paroli. Nun mi volas nur diri jenon: ni ĉiuj estas reprezentantoj de la ideo de lingvo internacia, ni faru kun ĝi, kion ni volas, sed ni agu honeste kaj ni memoru, ke pri niaj agoj la estonteco severe nin juĝos. Memoru, ke Esperanto estas nenies propraĵo, ke la esperantistoj havas plenan rajton fari kun ĝi ĉion, kion ili volas, se ili nur faros ĝin sin-

garde, lojale kaj interkonsente. Nur por gardi nian lingvon kontraŭ anarhio de la flanko de apartaj personoj, nia lingvo havas sian plej senpartie elektitan kaj el plej kompetentaj personoj konsistantan kaj konsistantan Lingvan Komitaton, kiu, dependante de neniu mastro, havas plenan rajton kaj plenan povon esplori kaj prezenti al la sankcio de la esperantistaro ĉion, kion ĝi volos. La Bulonja Deklaracio malpermesas nur, ke apartaj personoj rompu la lingvon arbitre, ĝi estas kreita nur por gardi la ekstreme necesan *kontinuecon* en nia lingvo. Se iu el vi trovas, ke ni devas fari tion aŭ alian, prezentu vian deziron al la Lingva Komitato. Se tiu Komitato ŝajnos al vi tro konservativa, tiam memoru, ke ĝi ekzistas ne por la plenumado de diversaj personaj kapricoj, sed por la gardado de la interesoj de la tuta esperantistaro; ke pli bone estas, ke la Komitato faru tro malmulte, ol ke ĝi facilanime faru ian paŝon, kiu povus malutili al nia tuta afero. Ĉar vi ĉiuj konfesas, ke la esenco de nia lingvo estas ĝusta kaj oni povas disputi nur pri detaloj, tial ĉio bona kaj ĉio efektive necesa povas facile esti farata en ĝi per vojo lojala, en harmonio kaj paco.

La personoj, kiuj volas altrudi al la tuta esperantistaro siajn dezirojn, diras ordinare, ke ili havas la plej bonajn ideojn, kiujn la plimulta da esperantistoj certe aprobus, sed iaj ĉefoj ne volas ilin aŭskulti kaj ne permesas al ili prezenti siajn ideojn por esplorado. Tio estas ne vera. Vi scias, ke laŭ la nova ordo, kiun per komuna voĉdonado akceptis por si nia Lingva Komitato, ĉiu homo ne sole havas la rajton prezenti al la Komitato siajn proponojn sed se la propono havas eĉ nur plej malgrandan ŝajnon de seriozeco, se inter la cent membroj de la Komitato la propono akiris por si eĉ nur

la aprobon de kvin personoj, tio jam sufiĉas, ke la Lingva Komitato estu *devigata* esplori tiun proponon. Vi vidas sekve, ke neniu povas plendi, ke oni lin ne aŭskultas aŭ ke iaj ĉefoj prezentas al voĉdonado nur tion, kion ili deziras.

Se iu diras al vi, ke oni devas ĉion krude rompi, se oni per ĉiuj fortoj kaj per ĉiuj eblaj rimedoj penas malkontentigi vin; se de la vojo de severa unueco, de tiu sola vojo, kiu povas konduki nin al nia celo, oni penas forlogi vin,—tiam gardu vin! tiam sciu, ke tio kondukas al malordigo de ĉio, kion multaj miloj da personoj atingis por la granda ĉiuhoma ideo per multjara pacienca laborado.

Mi finis. Pardonu al mi la malagrablan temon, kiun mi elektis. Ĝi estas la unua kaj espereble ankaŭ la lasta fojo en la historio de niaj kongresoj. Kaj nun ni ĉion forgesu; ni komencu la grandan feston, por kiu ni ĉiuj konvenis el la diversaj landoj de la mondo; ni ĝoje pasigu nian grandan ĉiujaran semajnon de la pure homara festo. Ni memoru pri tio, ke niaj kongresoj estas ekzercanta kaj edukanta antaŭparolo por la historio de la estonta interfratigita homaro. Por ni estas grava ne iaj bagatelaj eksteraj detalaĵoj de nia lingvo, sed ĝia esenco, ĝia ideo kaj celo, tial ni antaŭ ĉio devas zorgi pri ĝia seninterrompa *vivado*, pri ĝia senhalta *kreskado*. Granda estas la diferenco inter hominfano kaj homoviro; granda eble estos la diferenco inter la nuna Esperanto kaj la evoluciinta Esperanto de post multaj jarcentoj; sed dank' al nia diligenta gardado, la lingvo fortike vivos, malgraŭ ĉiuj atencoj. Ĝia spirito fortiĝos, ĝia celo estos atingita, kaj niaj nepoj benos nian paciencon.



# P R E S S

When not otherwise stated, any book or magazine reviewed is sold by our book department

## ESPERANTO IN FIFTY LESSONS.

Sold by American Esperantist Company, 235 Fortieth St., Chicago. Fifty cents net; 55c postpaid.

Many persons in the United States have little difficulty in reading Esperanto. They can even write a fairly good letter in Esperanto; but when it comes to speaking the language, they act as if they had been suddenly struck dumb. Now, as a matter of fact, one can learn to speak Esperanto much more easily than any other language. One can start from a reading and writing knowledge of it, and gradually, even with one's own efforts, build up from this foundation a respectable speaking knowledge of the language. But it is a great help to have ready-made phrases with which one can begin to gain this speaking knowledge. Indeed for nine persons out of ten no such knowledge will ever be acquired except with the help of a suitable phrase-book.

Such a book it is not easy to make. It must be simple, sensible, increasing gradually in difficulty. It must treat Esperanto as a living language. Therefore, according to the most approved modern methods of teaching, the book, except for certain explanations, should be written wholly in Esperanto. The learner must be taught from the beginning to *think in the international language*.

Such a book has been needed for several years, both in England and the United States. Several persons have thought of supplying this need; but when it came to the actual work of writing the book, all of them were found to be incompetent to do it. They were all of them lacking in the experience of teaching Esperanto by modern oral methods.

Sro. Privat however has had this experience. He has taught hundreds of

persons in Switzerland, England, and the United States, by such methods. He has made his pupils speak the language and think in it. Esperanto in Fifty Lessons is the result of his experience, and is now offered to the public as the best substitute for a course of oral lessons by a competent teacher.

We cordially commend this book to all Esperantists in this country and in Great Britain. Every class and club should immediately buy several copies of it. Indeed, everyone who really wishes to learn Esperanto could do no better than to learn by heart as much of this book as possible. Even if you do not care to do more than to read and write Esperanto, you will find that you will get even this more easily by learning to speak the language a little; and Esperanto in Fifty Lessons will do this for you, *if you will use it in the proper way*.

The Preface gives instructions about this. It warns you not to read the book, but to speak it. We would insist on this point: The book is for the ear and the tongue, not for the eye. *Always read every word in it aloud two or three times; and when you have done this, close the book and repeat what you have read two or three times.*

The book is admirably printed in large clean type. The paper is excellent, and the book is provided with a good cover. Finally, there is hardly an error in the book. This is as it should be; and in this respect too, Esperanto in Fifty Lessons contrasts most favorably with many other Esperanto text-books.

We congratulate Mr. Privat and his publishers for providing us with such a useful book, and we again advise every one who wishes to speak Esperanto to get a copy of it.

J. F. TWOMBLY.

*Oficiala Gazeto Esperantista.*—Jam venis tri numeroj de tiu ĉi por esperantistoj plej grava ĵurnalo, kiu sin anoncas "organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongreso." Kompreneble, ĝi enhavas plejparte oficialajn dokumentojn kaj novaĵojn. En la tri aperintaj numeroj estas 137 paĝoj. Oni povas aboni ĝin la tri Centra Oficejo, 51 rue de Clichy, Paris, ponumere 50 centimoj, poĵare 5 frankoj. En nia librejo estas kelkaj ekzempleroj de ĉiuj numero, venteblaj po 15 cendoj, aŭ, kun jara abono, po \$1.15.

*Aladin; aŭ La Mirinda Lampo.*—Tiu ĉi verkaĵon tradukis esperantan Major-Generalo George E. Cox kaj eldonis la Brita Esperantista Asocio. Ĝi enhavas 60 paĝojn de pli ol ordinara grandeco kaj la nomo de la tradukinto atestas, ke estas bona traduko. dum la mondfamo de la "Mil kaj Unu Noktoj" certigas la plenan intereson por ĉiuj, kiuj ne antaŭe legis la rekonton. Prezo afrankite, 20 cendoj.

*La Abatejo de Westminster.*—Dro. J. C. O'Connor tradukis tiun ĉi verkon el Washington Irving, kaj presigis ĝin kun anglaj notoj pri la signifo de multaj vortoj. farante ĝin tre bona libreto por la legado de komencantoj. Afrawite, 15 cendoj.

*How to Acquire Fluency in Esperanto.*—Nova verketo kies titolon sufiĉe klarigas ĝian celon. Afrakite, 5 cendoj.

*How to start and Keep Going an Esperanto Group.*—Pri tiu ĉi verketo kaj ĝia celo ni povas diri, ke baldaŭna numero de la *Esperanto Bulletin* plene traktos tiun ĉi tenmon laŭ la amerikaj kondiĉoj kaj spertoj. La jena libreto verkis W. M. Page, el Edinburgh. Prezo afrankite, 5 cendoj.

*Filipina Esperantisto.*—La junia numero estas presita ne la angla, esperanta, hispana kaj tagaloga lingvoj. Pro tio, ke vi eble ne konas tagalogan, ni prezentas frazon: *Hindi ko po, malilmitan kung gaano ang utang ko*

*sa inyo.* La signifo de tio estas: "Mi ne forgesos kiom da mono mi ŝuldas al vi." La gazeto estas ĉiam bonege redaktata kaj presata, kaj faras bonan propagandilon por montri al nekredinuloj. Ponumere, 15 cendoj.

*La Du Steloj.*—Oficiala organo de la Ĉila Esperantista Asocio. La titolo signifas, kompreneble, la verdan stelon de Esperanto kaj la blankan stelon de Ĉilujo. La gazeto havas belan kovrilon, sur kiu per kvar koloroj litografe presitaj la du standardoj estas prezentataj. La enhavo de 32 paĝoj en ĉiu numero estas plejparte presata dulingve. Ni ricevis kelkajn de la numeroj por Majo, Junio kaj Julio. Ponumere, 15 cendoj; jarabono, \$1.15.

*Internacia Scienca Revuo.*—Enhavo de la julia numero: La Geometria "Folietara," de Rene de Saussure; "La Ideoj de Sro. Le Bon pri la Naskiĝo kaj Morto de Materio," Marcel Finot; "La Sabina Bieno de Q. Horacio," Dro-Sellin; Pri Internaciaj Cekoj; Bibliografiaj Analizoj; Notoj kaj Informoj; Kroniko; Korrespondado. Ni havas de la I. S. R. la numeroj por Marto, Aprilo, Majo, Junio kaj Julio. Ponumere, 15c; jarabono, \$1.40.

*Tra la Mondo.*—La enhavo de la Julia numero faras liston tro longan por enpresi. Sufiĉas diri, ke ĝi konformas al la bona kutimo de *Tra la Mondo* doni plej diversan menuon de esperantaĵoj, bone ilustritaj. Ponumere, 20 cendoj; jare, \$1.80.

*Portraits of Zamenhof.*—The Inland Printing Company, of Spokane, Wash., has issued an elegant half-tone portrait of Dr. Zamenhof, 6x8 1-2 inches, printed on heavy plate paper with very wide margins. They sell it at 15 cents. The same print, trimmed flush and pasted on an india brown mount, suitable for framing, they sell at 25 cents. This firm is also preparing to issue an Esperanto game. The portraits can now be had from AMERIKA ESPERANTISTO.

## CORRESPONDENCE

I am interested in AMERIKA ESPERANTISTO, and the July number wore a dress that I liked. Magazines, to me, are like familiar faces and I don't like them to be changeable. Let us make the magazine a friend to be counted on, and don't change his attire!—MRS. A. P. WAR-RINGTON, Norfolk, Va.

It is true that the boisterous cover we wore in April, May, June and July is the only one which ever harmonized with the contents of the

magazine. Now, if one should unsuspectingly part the quiet lids of our September issue and find himself among the screaming, roaring advertisements his nerves would get as great a shock as though he were run over by a fire-engine in a country churchyard. Seriously, *karuloj*, we adopted the scheme of using a different color of cover paper each month in the early days of adversity, when it was necessary



to move the office every night in order to put the publisher to bed, and a distinctive cover for each month's issue was a delight and joy and convenience. It is still a great convenience in office work, but if fifty of you care enough about it to ask for the selection of a permanent color for the cover, write a post-card, and name the color of any issue you prefer. The color getting the most votes is elected.

#### WANTS INTERNATIONAL NEWS.

I am very much interested in your journal *ESPERANTO*, (this is not a request for a sample copy. I get it every month), and I thought a letter from me, if it happened to coincide with two or three thousand other letters from readers, might give you a hint as to the way we want our magazine to be conducted. I wonder if you could get your readers from all over the world to write us articles about what's doing in their country, politics, customs, what the people are thinking. In other words let each correspondent tell the other fellow about what he would like to know himself. I know by looking over your correspondence list each month you are well circulated enough to do this. Such a message every month could not help being of the greatest interest to—well, me, for instance. I have the greatest desire to see your journal of international language really doing international work. I really believe Esperantists are, as a class, advanced and interesting thinkers, and if we could get our friend from Prussia and the Sandwich Islands to talking to us, it would be a good thing all around. Hoping you will put this letter down not to impertinence, but to nothing more serious than a misguided interest, I remain, Yours very respectfully,  
T. S. STRIBLING, care Taylor-Trotwood Magazine, Nashville, Tenn.

#### TWO ESPERANTO PRAYERS.

Please translate the enclosed Child's Prayer for me. I want to see how we agree in our translation of it. I wish you would print the Lord's Prayer in the next number of your magazine. I feel sure it would greatly please the readers if you would do so.—W. H. CROWELL, 1600 Park Road, N. W., Washington, D. C.

You may compare the following with yours:

Nun min kuŝigante por dormado,  
Mi al Dio preĝas pri zorgado;;  
Se min portus mort' trans teran limon,  
Vi ho Dio, gardu la animon!

Kindly send your translation for publication. Others are asked to do the same. Dr. Zamenhof's translation of the Lord's Prayer, which has never before been printed in *AMERIKA ESPERANTISTO*, is:

Patro nia, kiu estas en la ĉielo, sankta estu Via nomo; venu reĝeco Via, estu volo Via, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ, kaj pardonu al ni ŝuldojn niajn, kiel ni ankaŭ pardonas al niaj ŝuldantoj; ne konduku nin en tenton;

sed liberigu nin el la malvera, ĉar Via estas la regado, la forto kaj la gloro eterne. Amen!

#### TWELVE FOREIGN JOURNALS.

We buy wholesale quantities of many foreign magazines, and accumulate from time to time a miscellaneous collection of unsold copies. Some are all in Esperanto, some in two or three languages. These back numbers are excellent for propaganda, and we will send you an assortment of twelve copies, various titles, for \$1.00. Show them to your newspaper men and you catch their attention. If you prefer certain titles, say so in your order, though we don't guarantee to supply them in these bundles. We may say that there are about thirty of these bundles in stock, and as most persons who buy this way usually reorder, they'll all be sold in two weeks after this advertisement appears.

#### THE OCTOBER BULLETIN.

Those who get No. 2 of the *Esperanto Bulletin*, which is the October number (out October 1), will be surprised to see how much good matter it contains. In the first place, the columns have been widened and lengthened, so that about 45 per cent more space is available, and some of the matter is set in nonpariel type. Among the interesting contents is a reprint of the practical article by W. M. Page, secretary of the Edinburgh Esperanto Society, recently published in *The British Esperantist*, on "How to Start and Keep Going an Esperanto Group." With no apologies to Mr. Page, but with many thanks and without waiting for his permission, we have made a few changes in the article to adapt it to American conditions, and it will appear in the *Bulletin*. In connection is a suggested propaganda article for local papers and a model constitution for a local group, this latter being copied from that of the Pioneer Esperanto Club, of Manchester, N. H. There is a full revised and corrected print of the Constitution and By-Laws of the Esperanto Association of North America, with a directory of officers. The *Bulletin* contains other propaganda matter, and a synopsis of Esperanto grammar and word-building.

#### MORE CHEAP ADVERTISING MATTER.

The "power of the press" in advertising Esperanto is never to be over-estimated and it is the constant aim of *AMERIKA ESPERANTISTO* to supply printed matter as cheaply as possible. The fact that we buy in immense quantities under a yearly contract, and sell propaganda matter at cost or below, should bring to this house the co-operation of all propagandists. Just now we have in mind a still cheaper edition of Elements of Esperanto. This is to be printed on ordinary newspaper, and instead of being folded and stitched it will be made up in four pages, nine by twelve inches. Any club which is willing to wait a few weeks for delivery can have 5,000 copies of this edition, with fifty words of matter relating to the club,

time and place of meeting, etc., for \$5.00; or, if any club orders 20,000 at \$20.00, they will be printed within ten days. These prices are f. o. b. Chicago, by freight or express. The edition will weigh 17 pounds per 1,000. On these terms it will be produced only in multiples of 5,000.



MAJOR STRAUB.

PICTURES always help to enliven a newspaper article and catch the attention of the hasty reader. Part of the publicity plans of *Amerika Esperantisto* are to supply coarse engravings adapted to printing in newspapers. Most of these will be portraits of prominent Esperantists or persons who for any reason have attained public

notice through Esperanto. These engravings we shall supply at cost on the basis of many reproductions. They will be in three sizes: Half-column (No. 1), single-column (No. 2) and double-column (No. 3). Most of the series will probably be prominent European Esperantists who will attend the Fifth Congress. Just now we have only the following: Dr. Zamenhof (in sizes 1, 2, 3) Major Straub (1, 3), and Miss Winifred Stoner, child Esperantist (1, 2, 3). The prices of the engravings, ready to print, postpaid, are: No. 1, 25c; No. 2, 50c; No. 3, \$1.00.

Oh, Mr. Carl Hyldahl, of 4735 Constance street, New Orleans, we salute you! There is nobody quite like you on our whole list—and we are glad over you. This morning we received your communication, written in three sections, on three cards to three different departments of this house, and the blooming, blushing beauty of the thing is that you neglected not to write your address plainly on each card. It is unconventional, unusual, and sensible. Nearly all sensible things are unconventional, when you come to think of it. Just think of the things you might have said! You could have begun your communication: "Dear Sir—" though a man who would call another "dear" in conversation would be shot on the spot, and you could have said: "Having long been a reader and admirer of your esteemed journal,

which, in my humble estimation, etc., etc." and "you doubtless remember that in my last order," which of course nobody in the office could possibly remember; and somewhere in the middle of three pages of hot air you could have deftly secreted the real business of your letter. Then the girl at the order desk would have waded through it all, and sighed, and sent you a card, for she has nothing else to do; and at three this afternoon it would have gone to the advertising desk and the man over there would have said: "Oh, \_\_\_\_\_! I haven't time to go into all that now!" and it would have been chucked into a pigeon-hole, to emerge some days later and be sent to the secretary of the Association. But just because you were so unconventional as to use three sheets of paper with your address on each and state your three errands in brief, plain English (or Esperanto), your three replies will go to you in the noon mail. And that is why the whole office sends you greeting.

#### AS TO "MEM"

Will you kindly explain the following in the columns of your valuable magazine: In Bullen's Lessons (Ex. 12) are the following sentences: *Mi amas min mem*; *vi amas vin mem*; *li amas sin mem*; k. t. p. In Cox's Grammar the accusative of the pronoun *min*, *sin*, k. t. p. are used alone to express the idea of self. What is the correct use of the word "mem?"

On page 89 of the July number of the *AMERIKA ESPERANTISTO* I find twice the participle "grimpante," which is simply translated "up" in both instances. I do not find the root in any of the dictionaries which I have. What is the meaning of the root-word?

ROLLAND B. MOORE.

"Mem" means the same as English "self." It expresses the personality more than the person, and is sometimes used where the logic of the sentence already implies "self" in some other word. It emphasizes the "self" idea in such cases. If you can forget English for a moment you'll have no trouble in understanding *mem*.

*Grimpi* means "to climb."


Just as this magazine goes to press it is learned that the long-expected Rhodes English-Esperanto Dictionary is now ready. A supply is en route from New York. The price of the book is \$2.00 postpaid.

## ORIENTO KAJ OKCIDENTO

ESTAS parto el la ĝenerala plano de AMERIKA ESPERANTISTO interkonigi la esperantistojn de Usono. Kun plezuro ni prezentas jene portretojn de du sami-

peranto la ĉefojn militistajn de la lando.

La dua portreto reprezentas Sro. Charles Elwood Randall, el Seattle, Washington. Sro. Randall estas unu el



CHARLES E. RANDALL, A PROMINENT ESPERANTIST OF THE PACIFIC COAST.

deanoj, el kiuj ĉiu estas bone konata en sia hejma loko kiel fervora puŝanto de la afero.


La unua, Sro. James W. Cheney, el Washington, estas de longe esperantisto, kaj tenas la oficon Estro de Biblioteko de la Fako Militista. En tiu ofico Sro. Cheney multe klopodis atentigi pri Es-

la esperantistaj ĉefoj de la Pacifa Marbordo, kaj kune kun R. H. Geoghegan, Wm. G. Adams kaj aliaj, organizis la movadon en Seattle. Li ofte verkas esperantajn artikolojn pri sciencaj kaj radikalaj temoj, kaj estas en sia ŝtato eminenta socialisto kaj partiano de la ligoj laboristaj. Lia nuna okupo estas

negocado je loĝejoj, domoj, k. t. p.

Antaŭ kelkaj semajnoj, Sro. Randall elverkis tradukon je la de Stevenson famekonata novelo *A Millionaire of Rough and Ready*. Tiu estas novelo

tranto de AMERIKA ESPERANTISTO decidis ĝin ne eldoni ĝis kiam nia *Subscription Library* ricevos plu da abonoj. La regula vendprezo de la libro estos ĉirkaŭ 50 cendoj, sed al tiu, kiu abonos ĝin



JAMES W. CHENEY, LIBRARIAN OF THE WAR DEPARTMENT AND ONE OF THE LEADING WASHINGTON ESPERANTISTS.

pri vivo kaj okazoj en unu el la minejoj de okcidenta Ameriko, kaj estas kredeble karakteriza kaj okazplena rakonto pri unika elmonro de la Amerika vivo. Estas iomete granda verko, havante en la originala 168 paĝojn, kaj la adminis-

antaŭ la eldoniĝo la prezo estos po duone. Per la efektiviĝo de tiu plano oni esperas eldonigi multajn bonajn verkojn kaj tradukojn de amerikanoj, kaj tiel fortikigi ĉe ni la staton de la lingvo.